

la 16^{an} de Dec. 1929

Kara Amiko

Mi supozas ke vi ĉiam estas en Přelouč + tien sendas miajn plej korajn bondezirojn por Kristnasko + Novjaro.

Mi oftege pensas al vi + ĉiam al mi dolora estas la penso ke nia interkorespondado ĉesis.

Mi pasigis malĝojan finon de l'jaro. En Oktobro mia sola amata frato mortis. Mi estis kun li dum 5 tagoj antaŭ lia morto en Pau (Pyrénéoj) + estis ankaŭ kun li kiam li mortis. Estis terure dolore.

Poste, antaŭ 4 semajnoj mi malsaniĝis tre grave. Oni kredis ke estis la difterio, sed la kulturigo de la baciloj elmontris ke ne, + estis pusa angino kiu malfeliĉe lasis abceson en la gorĝo. Mi fortege suferis. Mi eliris hodiaŭ por la unua fojo de 4 semajnoj. Sed baldaŭ mi esperas esti tute sana.

GeSroj Guerra el Meksikujo, pasigis 3 tagojn tie-ĉi - mi enmetis ilin en hotelo por kuŝi, pro mia malforteco.

Mia edzo laboregas kiel ĉiam. Mia filo hodiaŭ ĉe la asizjuĝantaro defendas krimulon kiu depecis sian fianĉinon + enmetis ŝin en sakon. Estas tre grava afero + mi supozas ke li estos guilotinigita. Li meritas tion. La multega personaro ĉe la Tribunalalo estas tre granda + la policaro faris "service d'ordre". Pro mia malsano mi ne povis iri. Estas en Arras (3 horojn de tie ĉi).

Mi esperas ke vi, via edzino + Eveto tute bonege fartas. Ĉu mi revidos vin en Köln? Mi esperegas ke jes. Mia malnova amiko, mi al vi premas la manojn dezirante mil bonaĵojn + bonecojn al vi.

Ĉiam same

Alice Sergeant